

世界语基础速成讲座

第八讲

学习要点:

主语从句

表语从句

定语从句

课文

词汇:

profesoro 教授

studento 大学生

stacio 站

stacidomo 火车站

trajno 火车

pasi 经过

atendi 等待

atendejo 候车室

bileto 车票

permesi 允许

ajn 任何

passaĝero 乘客

atingi 到达

peti 请求

helpo 帮助

oficisto 工作人员

atentigi 提醒

babili 聊天

vigle 活跃

aŭdi 听到

rido 笑声

minuto 分钟

ignori 不顾，忽视

atentigo 提醒

absorbiĝi 专门于，沉迷	kuri 跑
rimarki 注意到	kuregi 狂奔
ankoraŭ 仍然	lasi 留下，离开
kvankam 虽然	kajo 站台
trapasi 经过 路过	ĝoja 高兴
ĝis 直到	forta 有力气的
informi 通知	konsoli 安慰
daŭrigi 使.....继续	trankvila 平静的
sen 没有，(与 kun 相反)	aranĝi 安排
lasta 最后的	tranokti 过夜
haltiĝi 停止	deprimita 沮丧的
senmove 一动不动	devi 必须
krii 大喊	partopreni 参加
entrajniĝi 上火车	kunveno 会议
alie 否则	sekva 接下来的，第二天
veturi 乘车	adiaŭi 送别，告别
vekiĝi 醒来	

课文: Vojaĝo de maljuna profesoro

Estis malgranda stacidomo, kie estis malmultaj homoj kaj trapasis malmultaj trajnoj ĉiutage. Iutage en la atendejon venis kelkaj viroj, el kiuj unu estis maljuna profesoro, kaj la aliaj estis liaj studentoj. Ili aĉetis

bileton, kiu permesis unu pasaĝeron atingi Londonon per iu ajn trajno.

Post kiam ili sidigis la maljunan profesoron, ili petis helpon de oficisto, ke li atentigu ilin antaŭ ol venos la trajno al Londono. Poste, la studentoj sidiĝis ĉe la profesoro kaj ekbabilis kun li. Ili babilis kaj ridis tiel vigle, ke oni ofte aŭdis iliajn ridojn. Poste, la oficisto venis kaj diris al ili, ke trajno al Londono venos post kvin minutoj kaj restos du minutojn en la stacio. Sed ili ignoris lian atentigon pro tio, ke ili absorbiĝis en sia babilado.

Poste, la oficisto rimarkis, ke la viroj ankoraŭ sidis babilante kvankam la unua trajno al Londono jam trapasis. Li atendis ĝis baldaŭ venos alia trajno al Londono, kaj informis tion al la babilantaj viroj. Sed ili ankoraŭ ignoris lin kaj daŭrigis sian babiladon. Do aliaj trajnoj ankaŭ trapasis sen ili.

Post kiam la lasta trajno de tiu tago haltiĝis en la stacio, la oficisto rimarkis, ke la viroj ankoraŭ babiladas senmove, li do kriis al ili. "Tuj entrajniĝu, alie vi ne povos veturi al Londono hodiaŭ!" Aŭdinte tion, ĉiuj viroj vekiĝis el sia babilado. Ili tuj stariĝis kaj ekkuregis al la trajno. La junuloj kuris rapide kaj sukcese entrajniĝis antaŭ ol la trajno ekmoviĝis, lasante la maljunulon sur la kajo.

La maljuna profesoro estis tiel malĝoja, ke li sidiĝis senforte sur la kajo. Vidinte tion, la oficisto tuj alkuris kaj konsolis lin: "Ne maltrankviliĝu, sinjoro. Ne malĝoju. Mi povos aranĝi vian tranokton en la

stacidomo, por ke vi atingu Londonon per la plej frua trajno morgaŭ."

La maljunulo diris deprimate: "Ve! Mi mem devas iri al Londono por la kunveno okazonta en la sekva mateno. Ili venis nur por adiaŭi min!"

佛学阅读:

paŝtisto 牧民, 牧人

vestaĵo 衣物

trezoro 财宝

trezorejo 宝库

sendi 派, 派人

kapti 抓

trovi 找到

eskorti 护送, 押送, 护卫

havi 有

havigi 使.....拥有

heredi 继承

avo 祖父, 爷爷

ordoni 命令

aparteni 属于

konvena 合适的

sur-pied-igi 穿在脚上

porti 拿, 端, 穿, 戴

surhavi 穿着

talio 腰

kunveno 会议, 开会

kunvenigi 招集

surporti 穿

meti 放, 置

surmeti 放在.....上

fuŝi 拙劣地做, 弄坏, 搞糟,

胡搞

fuŝ-aĵ-o: 【及物】拙劣地做,

弄坏, 搞糟, 胡搞...的物(东西、

事)

simbolo 比喻

preni... kiel... 拿 作

为.....

kredi 信仰, 相信

kredanto 信徒

doktrino	教义	klara	清澈的，明白的，清
kompreno	明白，理解		楚的
ĝusta	正确的	signifo	意思，意义
mistifiki:	【及物】愚弄，	vera	真实的
戏弄，哄骗		detala	详细的
klarigi	解释		

8. Paŝtisto ŝtelis vestaĵojn el la reĝa trezorejo

Iam antaŭe paŝtisto priŝtelis trezorejon de la reĝo kaj forkuris malproksimen. La reĝo elsendis homojn al diversaj lokoj por kapti lin. Fine oni trovis kaj eskortis lin al la reĝo. La reĝo demandis, de kie li havigis al si la vestaĵojn. Li respondis: "La vestaĵojn mi heredis de mia avo."

La reĝo ordonis, ke li sin vestu per la vestaĵoj. La vestaĵoj ne apartenis al la paŝtisto, do li tute ne sciis kiel sin vesti per ili konvene. Li surpiedigis tion, kion oni portis sur la manoj kaj surkapigis tion, kion oni surhavis ĉirkaŭ la talio.

Vidinte tion, la reĝo kunvenigis la korteganojn kaj parolis pri tio. Li diris al la ŝtelisto: "Se la vestaĵoj apartenus al via avo, vi devus scii kiel surporti ilin. Kiel vi surportis ilin malkonvene kaj surmetis la suprajn vestaĵojn malsupre? Pro via fuŝaĵo mi scias bone, ke la vestaĵoj ne apartenas al vi, sed estas priŝtelitaj de vi."

Mi prenas la rakonton kiel simbolon. La reĝo simbolas la Budhon kaj la trezoro simbolas la Darmon. La malsaĝa paŝtisto simbolas kredantojn de aliaj religioj. Preninte la budhan instruon, ili metas ĝin en sian doktrinon kiel sian propran scion. Tamen pro ilia nekompreneco al ĝi, ili uzas ĝin malĝuste kaj mistifikas aliajn homojn, anstataŭ klarigi la veran signifon. Ili similas al la paŝtisto, kiu ŝtelis trezorajn vestaĵojn de la reĝo, sed nek sciis detale pri ili, nek povis sin vesti per ili konvene.

表语从句:

我的问题是，你是不是学生。demando 问题。

Mia demando estas, ĉu vi estas lernanto.

主语从句

他学得好，那是真的。

Ke li lernas bone, estas vere.

ke li lernas bone, tio estas vera.

Tio estas vera, ke li lernas bone.

Estas vere, ke li lernas bone.

vera 真的 tio 那。 bona 好的。

lerni 学习 lernanto / studento

定语从句

Mi vidis knabon legintan/legantan/legontan libron.

我看到个读完书/在读书/将要读书的男孩。

Mi vidis knabon, kiu estis leginta/leganta/legonta libron.

我看到了你昨天读过的那本书。

看到 vidi 昨天 hieraux

Mi vidis la librojn legitajn de vi hieraŭ.

Mi vidis la/tiun librojn, kiujn vi legis hieraŭ.

我认识那个偷你书的男孩。 koni 认识, 偷 ŝteli

Mi vidis la knabojn ŝtelintajn vian libron.

Mi vidis la knabojn, kiuj ŝtelis vian libron.

我想知道, 世界语是不是有意思。

ĉu voli 想要, scii 知道

Esperanto 世界语 interesa 有意思, 有趣的

宾语从句

他说他喜欢世界语。 diri 说 ŝati 喜欢 ami 爱

他问我, 世界语是什么。 demandi 问。

我告诉他, 世界语是一种很容易学的语言。

diri 告诉, facila 容易, tre 很 tre lingvo 语言 lerni 学习

por

他问我, 我在学什么。

课外读物:

Paro da geedzoj kverelis pro io, kaj unu estis pli kolera ol la alia. Ili ne plu volis paroli inter si. Poste ili sentis enuon kaj volis paroli unu kun

la alia, sed ili hontis paroli la unua. Iutage, la edzo devis peti helpon de la edzino, sed li hontis paroli la unua, do li skribis ion sur papero kaj metis la paperon sur la liton de la edzino. Poste li revenis al sia lito kaj tuj endormiĝis. Poste, la edzino iris al sia lito por dormi, kaj vidis la paperon. Estis vortoj sur la papero: "Patrino de la infano. Mi havos gravan kunvenon, kaj veku min je la oka matene." En la sekva mateno, la edzo vekiĝis je la naŭa. Li tuj sidiĝis kolere, sed vidis paperon sur la lito . Sur la papero estis vortoj: "Vekiĝu, la patro de la infano. Jam estas la oka kaj vi devas iri al la kunveno."